Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 17an de februaro 2011, per Skype.

(Aprobita la 10an de marto 2011.)

Partoprenis:

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Ulf Lunde en Os
Asbjørn Lindh en Oslo
Eli Fitjar en Bergen
Ingebjørg Rambjør en Bergen

0. Tagordo

Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 20an de januaro 2011

La protokolo estis aprobita. Ni ankaŭ aprobis la forgesitan protokolon de 5an de majo 2010.

2. Laborplano 2011–2013

La estraro interdiskutis kaj finfaris la laborplanon.

3. Jarraporto 2010

Diskuto pri la propono por la jarraporto. Jardar Eggesbø Abrahamsen finredaktos la raporton ĝis la venonta estrarkunveno.

4. Enveninta propono por la Landa Kunveno

Douglas Draper proponas diskuti dum la Landa Kunveno la informadajn rimedojn de nia organizo, kun ĉefpunktoj: kompenso por la ĉesigo de Esperanto-nytt, ne-ĝisdataj retpaĝoj, informbroŝuro, gazetara agado, la manko de informa fako.

La estraro akceptas la proponon, sed elektas meti ĝin en la tagordon kiel «Diskuto pri informado», sen limigi la temaron.

5. Informa punkto

Ekzistas juraj limigoj por teĥnika aliro al la nunaj retpaĝoj, kio tro dependigas nin de la laborkapacito de unu persono. Jam dum kelkaj monatoj oni laboras pri novaj retpaĝoj kiuj faciligos kontribuojn de pluraj personoj. Transiro al nova servilo necesigos ankaŭ rearanĝon de la retpoŝta sistemo. La estraro vidis malneton de la novaj retpaĝoj, fare de Judith P. Abrahamsen.

6. Laborplano 2011–2013

La estraro komencos labori pri la plano interrete kaj pludiskutos dum la venonta interkonsiliĝo, la 17-an de februaro.

7 Eventualaĵoj

Nenio.

La interkonsilĝo daŭris inter 19.30-21.56.

Raportis Ingebjørg Rambjør